# Raporto de DEA por la jaro 2023

En la jaro 2022 ni ricevis la informon ke DEA heredis 136.000 kr el nia multjara membro Birthe Trærup. La hereda proceso daŭris pli ol duonon jaron, kaj komence de 2023 ni ricevis la monon.

Ni tuĵ decidis donaci 20.000 kr al DEJO, kiu antaŭ ne longe ekhavis kasiston.

Tiajn ekstrajn monon donis al ni elspeci pli, kaj ni decidis sendi 220 kilogramojn de jam legitaj libroj al la esperantan asocion en Benino en la okcidenta parto de Afriko. La libroj, kiu restis en skatoloj sur la planko de mia vivĉhambro dum kelkaj jaroj, estis de nia biblioteko kaj malavaraj donacoj el Betty Chatterjee kaj Ana Røssum.

Post iom da ŝercado mi trovis transportan firmaon kiu ofertis sendi la librojn al Benino pere de ŝipo, kiu estis la plej malmultekosta solvo. Mi havis bonan kontakton kune kun la prezidanto de la Benina asocio Latifou Gabadamassi kaj li kompreneble feliĉis pro la donaco. Mi proponis al li ke ili povus plidonaci parto de la libroj al la frata asocio en Togolando.

Pro nia pli bona ekonomia situacio ni decidis provi aldoni reklamon en Facebook. Pli ol 13.000 personojn vidis la anoncon, sed bedaŭrinde kun iom magra resulto. Nur venis kelkaj lernantoj.

Kiam mi ŝercis la transportan solvon mi estis en kontakto de organizo Dansk Afrika Selskab. Kiam ties sekretario audis ke mi estis esperantisto, ŝi invitis min fari prelegon pri nia lingvo en sia asocio.

UEA laboras kadre de UNESCO farigi la 24-an de julio internacian tagon de Esperanto. En tiu proceso estas kompreneble avantaĝo se niaj lokaj naciaj komitatoj subtenas la ideon, por ke ĝi povus voĉdoni por tio propono en UNESCO. Mi skribis al la dana UNESCO komitato, sed ne recevis respondon. Post kelkaj vanaj provoj repeti respondon, mi iĝis obstina kaj sendis al ilin fizikan leteron kune kun suplementaj informoj, sed bedaŭrinde ankaŭ vane.

Kiel vi povis legi en nia revuo Esperanto en Danio, ĝi ekhavis novan kunredaktoron. Bonvenon Louise Wangberg, ni estas tre dankema pro via laboro.

La Kultura Nokto okazis la 13-a de oktobro kaj alogis multe da junuloj. Ili vigle demandis kaj diskutis nian lingvon, kaj kelkaj interesiĝis lerni Esperanton.

Nia Zamenhofa festo okazis la 16-a de decembro en Kulturhuset Pilegården en Brønshøj. Ni kantis kelkajn kantojn kaj feliĉe Hans Christian povis akompani ni pere de lia guitaro, kaj krome li ludis kelkajn proprajn kantojn. Bent kaj Pia faris kvizon kaj estis bona tago kun bona etoso.  Mankis al ni Jens kiu tranlokiĝis al Jutlando.

Peter Wraae